

Konsiloj pri tradukado de kantoj
Roel Haveman

Laŭ peto de Floreal Martorell mi pritraktas ĉi-artikole kelkajn atentopunktojn rilate al tradukado de kantoj en Esperanton. Unue mi prezentas kelkajn ĝeneralajn konsiderojn, kaj poste mi preparolas kelkajn pli specifajn temojn: rimon, ritmon, fluecon kaj enhavon.

Ĝeneralaj konsideroj

Estas multaj atentopunktoj kiuj ĝenerale rilatas al tradukado. Kelkajn mi mencias ĉi tie. Tradukado de kantoj tamen, estas io tute alia ol tradukado de prozo.

- Tradukoj estu lingve seneraraj. Oni ekzemple ne apostrofu adjektivojn aŭ vortojn kun akuzativa finaĵo.
- Tradukoj stile kongruu kun la originalo teksto. Tio signifas ekzemple, ke se la originalo uzas ĉiutagan lingvaĵon, oni ne traduku tro literaturece per multaj neologismoj k.t.p.
- Tradukoj estu vivipovaj per si mem. Legantoj kaj aŭskultantoj laŭeble ne rimarku, ke temas pri neoriginala teksto. Oni do konsciu, ke tradukado ne estas lerneja ekzerco por pruvi al instruisto la bonan komprenon de la originalo. Tiu ĉi konsidero havas kelkajn konsekvencojn:
 - o Se estas malfacile trovi rime kaj ritme taŭgan tradukon, oni ne timu iom alivortigi la ideon de la enhavo, elektante alian bildon aŭ komparon. Tradukoj ofte elspiras tradukitecon kaj torditecon se oni rigore tradukas laŭvorte.
 - o Oni ne sklave kopiu fuŝojn aŭ fuŝetojn el la originalo. Se la originalo uzas nevivajn, senkolorajn rimojn kaj komparojn, fuŝas pri akcentoj k.t.p., oni ne nepre kopiu ilin. Tradukoj emas esti iom malpli bonaj, malpli sukaj, ol la originalo, do oni ne maltrafu ŝancojn igi tekston pli ĝuinda por la aŭskultantoj. Aliflanke, oni kompreneble ne korektu "fuŝojn" ironie, parodie aŭ aliciele intencitajn.
- Ĉe tradukado de kantoj oni trovu kontentigan solvon por kombini ritmon, rimon kaj enhavon. Tio estas tre temporaba. Konsciu, ke tradukado de nur unu kanto povas esti plurtaga lukto.
- Kelkfoje povas montriĝi neeble taŭge kunforĝi la ritmajn, rimajn, enhavajn kaj vortludajn nuancojn. Ankaŭ povas esti, ke la originalo enhavas tro da kulture specifaj aferoj kiuj estas nekomunikeblaj al internacia publiko. Tiam oni konsideru iom pli draste ŝanĝi la enhavon, por ke la traduko iĝu tamen interesa. Eble oni petu helpon aŭ konsilojn de kolega tradukanto. Alia konsidero estas, ke eble estas pli bone rezigni ol fuŝi.

Rimo

- Se en la originalo troviĝas rimo, ĝi aperu ankaŭ en la traduko. Nur malofte la rimvortoj en la originalo kaj en la traduko povas esti signife identaj. Tiokaze oni trovu rimvortojn, kiuj havas alian signifon. La alivortigita verso plejeble esprimu la ideon, la intencon de la originalo.
- Ĉe tio oni atentu, ke la rimvortoj restu "interesaj", ĉar rimoj tiras la atenton de la aŭskultantoj. La unua vorto de la rimparo iel preparas la aŭskultanton, kaj la dua vorto de la rimparo estas la iom surpriza, frapa "fino". Tial oni evitu sensignifajn, malplenajn, tedajn vortojn kiel duan vorton de la rimparo. Tial ekzemple personajn pronomojn oni ŝpareme uzu kiel rimvorton. Prefere ne skribu:

Min turmentas tragedi'
Pro subita mort' de vi

Eble oni povus interŝanĝi la versojn (laŭbezone oni kuraĝe faru tion!), ĉar tragedi' estas pli interesa rimvorto ol vi:

Pro subita mort' de vi
Min turmentas tragedi'

Tamen, se "malplenaj" rimoj aperas en rapide kantata parto, tiu ĉi punkto povas esti malpli grava, ol se temas pri fragmentoj kiuj muzike estas forte akcentitaj. Ankaŭ se la originalo estas enhance iom senpretenda kaj mem intence uzas simplajn rimojn, tiu ĉi punkto povas esti malpli grava. Tamen, ĝenerale oni rimu per interesaj vortoj.

- Oni evitu t.n. adasismojn, t.e. sufiksajn rimojn. Do laboradas/dormadas, turmentita/_agrenita ne estas bonaj rimoj. Oni tamen povas uzi rimantajn sufiksojn se ilin subtenas la antaŭa litero aŭ silabo, do: frivolado/parolado.
- Laŭbezone oni uzu "neprecizajn" rimojn, kiel tagiĝo/feliĉo, virino/animio. Alikaze oni ekhavas tro da trivitaj rimoj, kiel for/kor'. Se la rimo sonas bone kaj kantiĝas bone, oni ne timu se temas pri preskaŭrimo!
- Uzu rimvortaron por ekhavi inspiron. Tre taŭgas Parnasa Gvidlibro de K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard. Tiu libro entenas multajn aliajn saĝajn konsilojn rilate versfaradon.
- Uzu PIV ne nur por kontroli la signifon de vortoj, sed ankaŭ por trovi (preskaŭ)sinonimojn. Sinonimoj estas tre utilaj, kiam oni serĉadas kontentigan rimparon. Esperantaj sinonimoj de Jaan Ojalo estas alia bona fonto por trovi trafajn sinonimojn. Ankaŭ nacilingva vortaro povas esti utila helpilo por tio.

Ritmo

- Oni zorge atentu, ke ĉiu silabo havu sian lokon en la muziko. Oni ne torde kunpremu plurajn silabojn en unu solan noton. Aliflanke, se en la originalo unu silabo estas kantita per pluraj notoj, oni kelkfoje tamen povus aldoni silabojn. En pop-roka muziko oni ofte emas silabumi iom malpli strikte: la kantisto variigas la silabonombron en muzike identaj lokoj. Tiam ankaŭ la tradukisto povus permesi al si ludeti kun la silabonombroj kaj ne rigore sekvi la kapricojn de la originalo. Ankaŭ tiam la tradukisto mem provkantu iomete por kontroli ĉu varioj estas muzike eblaj. Estas konsilinde precize indiki (ekzemple per substrektoj) kie en la teksto troviĝu la muzikaj akcentoj. Tiaj indikoj estas des pli gravaj, se oni tradukas por ne-esperantistaj kantistoj.
- Oni atente zorgu pri tio, ke la akcentoj de ĉiuj vortoj en la traduko precize koincidu kun la akcentoj de la originalo. Ĉe tio oni konsciu, ke en Esperanto la antaŭlasta silabo de ĉiu vorto estas akcentita, kaj ne la lasta (kiel ekz-e francoj foje emas fari). En kelkaj lingvoj oni permesas al si ofte iom devii de normaj vortakcentoj. Tiujn deviojn oni ne kopiu, ĉar Esperanto estas tre strikta se temas pri akcentoj.
- Se kantofrazo en la originalo komenciĝas per akcentita silabo, kelkfoje eblas en traduko antaŭe aldoni kroman, neakcentintan silabon. Oni mem provkantu iomete por kontroli ĉu la muziko tion efektive permesas. Tiel Bona travivaĵo povus iĝi Inspira travivaĵo.

Flueco

- Gravus atenti ĉu certaj vortoj ricevas specialan atenton (ekz. elstaran laŭtecon, muzikan efekton ktp.). En la traduko tiuj vortoj estu enhance kaj forme same taŭgaj. Vorto kiel plu, laŭforme multe pli taŭgas por kanti dum pluraj sekundoj ol ekzemple mond'.
- Ĝenerale estas bona ideo mem kanti vian tradukprovon laŭ la originala melodio por malkovri tiajn malgataĵojn. Ekzemplo: Mi iam tradukis angalingvan ĉenkanton, kiu entenis "follow, follow, follow, follow, follow, follow, follow me". Laŭritme tiu frazo facile tradukeblas per "sekvu, sekvu, sekvu, sekvu, sekvu, sekvu min". Evidente, se oni rapide kantis tian tradukon, ĝi montriĝus vera langorompilo; tute perdiĝus la flueco de la originalo. Por atingi ĝustan fluecon, mi kompromise ŝanĝis la enhavon kaj tradukis per "velu, velu, velu, velu, velu, velu ni").
- Troa uzo de apostrofoj ofte ĝenas la fluecon. Neniam apostrofu vortojn kiel kuniklo.
- Oni atentu pri harmonia, subtena kantado. Ankaŭ ĝi devas esti tradukita. Ĝi estu konforma al la ĉefa kantado kaj principe ne konsistu el dishakitaj silaboj.

Enhavo

- Ĉe kantoj plej unue atentu ritmon kaj rimon. La enhavo estas pli fleksebla. Per aliaj vortigoj oni ofte povas esprimi la samajn ideojn.
- Ne nur ĉe rimvortoj, sed ankaŭ ĝenerale, oni evitu tro da signife malplenaj vortoj en kantoj. Kelkaj tradukantoj emas plenigi mankantan silabon per do, ho, ja, nu, jen k.s. Tiukaze oni prefere foliumu en PIV por trovi iom pli longan sinonimon, kiu povus anstataŭi unu el la malpli longaj vortoj. Uzu la ŝtopilojn nur en kazo de urĝa bezono.
- Provu kolorigi palajn vortojn. Precipe la vorto estas estas signife sufiĉe pala. Anstataŭ: Mi estis en la urbo eble diru: Mi vagis tra la urbo. Anstataŭ: Mi estis hejme eble diru: Mi solis hejme.
- En kantoj oni laŭeble uzu lingvaĵon kiun oni ankaŭ uzas en normala prozo. Se tio montriĝas neebla, oni konsciu, ke en kantoj la lingvouzo povas esti pli libera ol en normalaj kuntekstoj:
 - o En kantoj oni povas pli vaste uzi neologismojn: tarda, dura, lanta, turpa.
 - o La vortordo povas esti pli libera: Mi kisis ĉarman lian amikinon.
 - o Oni pli libere povas verbigi adjektivojn (ekz. vi belas; la kato nigras)
 - o En kantoj oni foje povas forlasi la artikolon la, kie tio normale ne eblas. Ekz. Ni spitis malamikon anstataŭ Ni spitis la malamikon.
 - o Oni povas uzi ĉi antaŭaŭ ĉi tiu(j)(n): ekz-e: En ĉi nokto lunoplena, aŭskultu ĉi preĝon.
 - o En kantoj oni pli ofte evitas la sufikson -ec ol en prozo. Do dolĉo, intimo, senkoro anstataŭ dolĉeco, intimeco, senkoreco.
 - o Tamen, oni prefere ne uzu Esperanton laŭ iu nefundamenta "ismo" kiel "riismo", "alielismo" k.s.

En mia ttt-ejo mi kolektis kelkajn el miaj tradukoj kun ligoj al la originalaj tekstoj. Vi povus uzi tiun materialon por ekhavi ideon pri mia labormetodo: <http://www.tekstoj.nl/esperanto/kantoj/>

En la teksto mi enplektis komentojn de Gunnar Fischer, Giuseppe Castelli, Manuel Pancorbo, Marwine van der Molen kaj Anja Karkiainen. Se ankaŭ vi havas komentojn pri ĉi tiu teksto, bonvolu sciigi min (roel@tekstoj.nl). La plej aktualan version de ĉi tiu artikolo vi trovos en <http://www.tekstoj.nl/esperanto/konsilij.htm>